

Festivala Folio

BJELOVAR
2017
INTER-FEST
KROATIO

n-ro 3
lundo
la 7-an de aŭgusto
2017

KURIERO DE INTER-FEST

LA VETERO (MAL)FAVORIS NIN



Fotis Sanja Pleskina Forjan

*La dua festivala tago havis siajn brilajn kaj malpli brilajn momentojn. Ĝi komenciĝis per la Solena Inaŭguro kaj suna vetero, kiu ebligis efektiviĝi la komunan fotadon en la urba parko. Sed la tago finiĝis per pluvego, kiu malebligis la longe atendatan kaj zorge preparatan koncerton **Bjelovar per koro kantas**, kiu estis dediĉita al la urbanoj kaj devis okazi samloke kiel la fotado.*

Por la koncerto longe preparadis sin eĉ kvar kultur-artaj societoj de la regiono kun 120 (!) kantistoj kaj dancistoj, kiuj ellernis eĉ kelkajn Esperantlingvajn kantojn. Anstataŭ en la urba parko, la koncerto okazis en la Kulturdomo, sed kun malpli da spektantoj, ol planite.

EMOCIA KAJ RIĈENHAVA INAŬGURO DE INTER-FEST

La Solena Inaŭguro okazis en la Kulturdomo de urbo Bjelovar. En la plenplena salono eksonis la kroata kaj Esperanta himnoj. Ilin kantis la juna kaj talenta kantisto **Dubravko Kovačević**. Je la nomo de la urbestro sinjoro **Dario Hrebak** salutis la partoprenantojn en la Festivalo sinjorino **Valna Bastijančić Erjavec**, kiu en sia emocia parolo menciis la longjaran historion de Esperanto-movado en urbo Bjelovar. Sinjorino Valna Bastijančić Erjavec kore bonvenigis la gastojn kaj la partoprenantojn de la kultura festivalo kaj emfazis, ke ĝi estas grava parto de la kultura programo de la urbo.

Sinjoro **Anto Mlinar** prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo en sia salutparolo diris, ke la Festivalo estas dediĉita al la 130-a jariĝo de Esperanto kaj al la 100-jariĝo de la forpaso de d-ro L.L. Zamenhof.

Por la Solena Inaŭguro la organizantoj preparis riĉan artan programon. **Dubravko Kovačević** kantis la kanton *En fenestro lumo brilas*, kies tekston Esperantigis s-ro Josip Pleadin. La junaj **Jakov Jurković** kaj **Sven Crnković** el la Muzika

lernejo de Bjelovar ludis saksofone, preparitaj de sia profesoro **Viktor Ključarić**.

Estis menciite, ke la unua Esperanto-libro aperis en julio 1887, sed la 6-an de aŭgusto 1945 okazis unu el la plej grandaj tragedioj en la mondo – la eksplodo de atombombo en Hiroŝimo, kaj la ĉeestantoj en la Inaŭguro spektis filmon *Hejme floras certe, sed...* dediĉitan al tiu ĉi tragedio, en kiu kantis japana grupo.



La programon suverene gvidis Ljiljana Rubčić en la kroata kaj Ljerka Stilinović en Esperanto.

En Bjelovar dum la obseda rego de la varmego mi tamen venas al superba beno de la kompreno pro l' amikeco, kiu regas sen kontest' en INTER-FEST.

Malgraŭ ke mi estis laca post longa vojaĝo el Rusio, mi ĝuis la unuan tagon: la feliĉajn infanojn, premiitajn dum la ekspozicio, la doktan prezenton de la Vortarego kaj, certe, la gajan interkonan vesperon.

Komenco bona – laboro duona!

(Mikaelo Bronŝtejn)

La fama Esperanto-kantisto **Mikaelo Bronŝtejn** kantis du Esperantajn kantojn: *Rusa frostoj* kaj *Blanka nokto*. La kroata esperantisto-kantisto **Neven Mrzlečki** plenumis du Esperanto-kantojn kaj **Françoise** kaj **Dédé** violonludis.

Je la fino de la Solena Inaŭguro estis prezentita la Loka Festivala Komitato kaj oni omaĝis la forpason de sinjoro **Radenko Milošević**, kiu aktive kontribuis al la organizado de la Festivalo, sed, bedaŭrinde, li ne povis vidi la belajn rezultojn de sia sindona agado.

La Inaŭguro de INTER-FEST 2017 estis ne nur impona, sed profunde emocia kaj ĝi prezentis la komencon de unu el la plej gravaj kulturaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo ĉi-somere.

Georgi Mihalkov



La publiko dum la Solena Inaŭguro

Raporton pri la prezento de libro *Elektitaj tekstoj pri Internacia Juro* de d-ro Ivo Lapenna, kiu okazis dimanĉe, pro spacomanko en ĉi tiu numero, vi povos legi en la numero 4 de *Festivala folio*.

LA SANKTA DISERVO EN ESPERANTO

La bjelovara katedralo de sankta Teresa de Ávila en la dimanĉa antaŭvespero estis okazejo de tute eksterordinara evento. Neniam antaŭe en ĝi oni povis aŭdi la Esperantan vorton. Kun la permeso



Kredantoj en la plenplena katedralo

de la episkopo de la diocezo Bjelovar-Križevci, s-ro **Vjekoslav Huzjak**, por la festivalo INTER-FEST sacerdoto **Rikardo Patafta**, la malnova esperantisto kaj membro de Bjelovara esperantista societo, preparis solenan kaj atentokaptan Esperantan meson, kiu kortuŝis la ĉeestantojn en la plenplena katedralo. La diservo de sac. Patafta okazis en elokventa Esperanto kaj ĝi montris al la kroataj kristanoj, ke Esperanto povas esprimi la sanktajn vortojn kaj penetri en homan animon. Ĝi estis la plej grava dimanĉa meso, kiun partoprenis ankaŭ multaj kredantoj-neesperantistoj.

La mesajn legaĵojn klarvoĉe prezentis **Grozdana Grubišić Popović**. La sekvadon de la mesaj ritoj tre faciligis speciale eldonita meslibreto, ricevebla ĉe la enirejo.

La meso estis kombinita kun la kroatlingva kantado de la katedrala koruso, kio al la tuta evento donis eĉ pli solenan karakteron.

HOMILIO OKAZE DE INTER-FEST

Karaj gefratoj!

Estimataj geesperantistoj!

Mi elkore salutas vin ĉiujn! Ni troviĝas en la katedralo de sankta Teresa de Ávila en Bjelovar. Ni venis en la Sinjoran templon por elpreĝi Dian benon je feliĉa kaj sukcesa laboro de la festivalo INTER-FEST en nia Urbo.

Gefratoj, ni konfesu niajn pekojn por inde celebri sanktajn misterojn.

Nia instruisto Jesuo Kristo mesaĝas: Kie estas la amo kaj amikeco, tie estas Dio.

La Esperanto-movado kunigas la homojn de la tuta mondo en komuneco de amo kaj amikeco – senkonsidere pri la nacio, haŭtkoloro kaj konfeso – ĝi strebas al justeco, egaleco kaj interkompreno, respektante la homan dignon, kulturon kaj morojn de ĉiu popolo – kaj nin ĉiujn kunligas unu lingvo, la internacia lingvo Esperanto.

En la hodiaŭa Evangelio laŭ Johano, apostolo parolas pri malsupreniro de la Sankta Spirito sur la apostolojn en Jerusalemo, kaj deziras memori nin pri la malnov-testamenta raporto pri la babilona turo.

La popoloj de Mezopotamio turnis sian dorson al la Sinjoro Dio kaj ekkonstruis la turon por proksimiĝi al Dio kaj detronigi Lin el la dia trono, por meti la homon sur la dian tronon anstataŭ Dio. Tio estis freneza ideo, la ideo de orgojla homo.

Dio konfuzis ilian menson kaj ili ne plu komprenis unu la alian kaj ĉesigis la konstruadon.

Je la festotago de Pentekosto – malsupreniris la Sankta Spirito, la tria dia persono, sur la apostolojn kaj sur la kunvenintan popolon, kiu parolis malsamajn lingvojn, kaj ĉiuj komprenis la Dian vorton, kiun anoncadi la apostoloj – ĝi estis la lingvo de amo, konkordo kaj komprenado. Ĝi estis la Pentekosta Esperanto. Ankaŭ nia Esperanto-



Sacerdoto Rikard Patafta dum la celebrado de la Esperantlingva Sankta Meso en la bjelovara katedralo de sankta Teresa de Ávila.

movado kunligas la homojn de la tuta mondo, uzante unu lingvon, Esperanton. Ni povas diri, ke Esperanto estas la donaco de la Sankta Spirito al la homaro, por kunigi ĉiujn homojn, ilian kulturon kaj kutimojn per la unueco kaj konkordo, kaj por konstrui la pontojn de amikeco kaj amo per ĝia helpo.

Esperanto kiel internacia lingvo devas servi ankaŭ al la Eklezio por anoncadi la Dian vorton kaj disvastigi la Dian regnon.

Mi dankas al la organizantoj de INTER-FEST en Bjelovar, kiuj en la semajnan programon enmetis ankaŭ la eŭkaristian celebradon de la sankta meso en nia katedralo. La kredantoj de nia Urbo aŭdu la Dian vorton ankaŭ en la internacia lingvo Esperanto kaj konvinkiĝu, ke oni povas glori Dion ankaŭ en ĝi.

Amen.

TIEN-REEN TRA LA PROGRAMOJ

LA KONCERTO DE MIKAELO BRONŝTEJN: Ĝi okazis en la Altlernejo kun partopreno de kvardeko da personoj. Oni povis ĝui la kombinitan programon, konsistantan el la poezio kaj kantado de la fama rusia aŭtoro, kiu fine recitis ankaŭ limerikojn. La programo estis ŝerca kaj bonhumora, ĉar la prezentanto rakontadis pri interesaj kaj amuzaj travivaĵoj en la iamaj junularaj Esperantaj tendaroj en Rusio. La aŭtoro ofertis ankaŭ siajn sondiskojn por aĉeto.

PREZENTO DE LA LIBRO *FRONTO AŬ DORSO* DE JÚLIA SIGMOND: La libron prezentis prof. Zdravko Seleš, kiu emfazis gravajn momentojn el la Esperanta kreado de la aŭtorino kaj menciis, ke kelkajn librojn Júlia Sigmond verkis kunaŭtore kun Sen Rodin. Profesoro Seleš diris, ke la libro enhavas rakontojn, impresojn kaj rememorojn de la verkistino, kiuj estas verkitaj en klara stilo kaj komprenebla lingvaĵo. Tekstojn el la libro legis la juna esperantisto Robert Milijaš.

KONCERTO DE RELIGIAJ KANTOJ: La koncerton, okazintan en la katedralo post la Esperanta Meso, plenumis la konata kroata operkantisto kaj esperantisto Neven Mrzlečki, membro de la Opero de la Kroata Nacia Teatro el Zagrebo. Li kantis aron da famaj religiaj kantoj en kelkaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Inter ili troviĝis verkoj de Bach, Händel, Bizet, Schubert, sed ankaŭ unu komponaĵo de la kantisto mem. La koncerto estis grava kontribuo al la Esperanta kulturo.



BJELOVAR PER KORO KANTAS

La longe planita kaj riĉenhava koncerto *Bjelovar per koro kantas*, en kiu partoprenis kvar kutlur-artaj societoj de la regiono, pro la subita pluvego ne povis okazi en la planita loko ĉe la enparka pavilono. Speciale preparita por la komuna spektantaro de la urbanoj kaj esperantistoj, kiuj venu amase en la publikan lokon, la koncerto fine devis okazi en la salono de la Kulturdomo. Tio grave reduktis la nombron da spektantoj kaj la efikon de la koncerto, sed la kantistoj kaj dancistoj, kiuj eĉ 120-kape venis sur la scenejon, ne konfuziĝis. Ili kantis kaj dancis kun entuziasmo kaj evidenta ĝuo dum pli ol unu horo. Iuj ensembloj por la koncerto preparis eĉ Esperantajn versiojn de konataj popolaj aŭ popularaj kantoj, kio varmigis la atmosferon ĉe la publiko, konsistanta plejparte el esperantistoj.



***La tago dua, senenua
alvenis kun vetero ĝua
kun solenaĵoj tre imponaj
prelegoj kaj koncertoj bonaj.***

***Do kun atento, ŝato, amo
mi partoprenis en programo
kun rev' ke l' tria tago bona
rezultos eĉ pli frukotodona.***

(Mikaelo Bronŝtejn)